# EKO 2021
## Esperigaj Komunikoj

Je via servo tra ok jaroj, depost 2013
2020: rekorda jaro: kun 60 komunikoj
Subtene al la loka, landa, faka kaj regiona agado

EKO 2021-23 sendita el Budapeŝto la 14-an de junio

*Al: Komitato, sekcioj kaj aktivuloj de ILEI, Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, TEJO-estraro, gazetaro, partoprenintoj en iuj AMO-seminarioj, aliaj listoj kaj unuopuloj. Pli ol 1500 ricevantoj. Kun plusendoj pli ol 2000.*

Por tuja uzo kaj plia diskonigo inkluzive de la alkroĉaĵoj kun indiko de fonto: EKO de ILEI kaj UEA

# Alteriĝis la unua kolombo

Aperis la unua numero de *La Kolombo de Paco*, la kuriero de la 2-a Virtuala Kongreso de Esperanto de UEA. Legu, ĝuu, senpage elŝutu, libere kaj aktive diskonigu ĝin al viaj amikoj en Esperantujo! Ĉe https://revuoesperanto.org/kolombo_1 - kaj ne forgesu aliĝi al la 2-a VK: https://uea.org/alighoj/alighilo rapida, facila proceduro. La kolombo alsurfaciĝis plurloke tra la socia babilosfero:

https://twitter.com/ueaviva
https://www.instagram.com/ueaesperanto/
https://www.facebook.com/universala.esperanto.asocio

La kvarpaĝa reta kuriero havas tre similan enhavan stilon kaj zorga aspektigo kiel la revuo *Esperanto*. Tio ne mirigu vin: la pretiga teamo estas precize Dima S. kaj Anna S, kiuj altnivele prizorgas la asocian organon. Kun ili agas la vic-prezidanto de UEA, Fernando Maia Jr., kiu verkis la enkondukon de la unua kajero. La dua paĝo konigas la plej diversajn eblojn anonci vin por partopreno en Virtuala Kongreso 2. La tria paĝo donas raporton pri AMO 73, sukcese kunorganizita kun IKEF (vidu diversajn EKO-komunikojn) kaj pli grave donas informojn pri AMO 74, kiu okazos enkadre de VK2. Same pri tio ni raportis kaj eĉ disponigis al enkondukan programeron por la seminario, kun la gravega titolo 'Kiel altiri pli da junaj membroj tra Eŭropo". La kvara paĝo skizas la aliĝeblon al la Nitobe-simpozio kaj montras la afiŝon por la Esperanto-Tago en la 26a de julio, okazonta tuj post VK2.




Entute la reta kuriero estas valora iniciato de UEA por konigi siajn kaj pliajn agadojn, kiu devos atingi nemembrojn kaj instigi ilin al aliĝo ĉu al VK2 ĉu samtempe al la Asocio. Ĉiuj estas bonvenaj uzi la kurieron informcele kaj kontribui.

SMG kaj Fernando Maia Jr., **Universala Esperanto-Asocio |** Vicprezidanto

-

# Daŭre gravas kaj indas lokaj kaj landaj revuoj

## Multan lego-plezuron el Pakistano

La Multana Esperanto Rondo (MER) en Pakistano eldonas bonan monataj revuon. La enhavo estas duone urdua kaj duone en Esperanto. Jarabono por reta eldono (12 ekz.). Pagu al la konto ĉe UEA: mero-t. Bv.informi pri la pago al **saluton123@yahoo.com**

Jawaid Eahsan, Ĝen. sekretario de MER

Plie, ni laŭdas kaj elstarigas revuojn fizikajn kaj retajn en nia movada firmamento: en Pakistano, Rusio (Ponto), Irano, Japanio, Turkio kaj Aŭstralio/Nov-Zelando.

















Jen revuoj el landoj pli foraj de la tradicia bazo de la Esperanto-movado. Ilia prosperado kontribuas forte al la plia tutmondigo de nia komunumo kaj ĝia kultura evoluo.  Subtenu ilin!

## Plia aliro al la Eŭropa debato

En EKO 22 ni prezentis la eblojn, por ke esperantistoj aktive partoprenu en la eŭropaj diskutoj. La akroĉaĵo donis detalajn informojn, kiel registriĝi kaj kontribui. La nova eblo venis pere de Sean Ó Riain kaj havas apartan intereson por membroj de ILEI kaj niaj edukistoj.

- **EU bezonas bonigitan lingvo-lernadon** ***(The EU needs improved language learning:***
  *(Proponas grandskalan projekton pri Multlingva Akcelilo en lernejoj)*
  https://futureu.europa.eu/processes/Education/f/36/proposals/23893

## Virtuala kunsidado – jam la naŭan fojon

La 30-an de majo 2021 okazis la 9-a virtuala renkontiĝo «Reto-9». Komence mi rakontis pri la pasinta en Dimitrovgrad renkontiĝo «VER-17» kaj reklamis venontajn somerajn rusiajn Esperanto-aranĝojn. Svetlana Pogorelaja el Ukrainio bonege prelegis pri «Unu jaro de virtuala instruado al pensiuloj», montrante belajn fotojn. Mikaelo Povorin tradicie prezentis kantojn (ĉi-foje tristajn, ĉar li dediĉis sian elpaŝon al Vladimir Samodaj, kiu forpasis antaŭ du monatoj). Fine de la kunveno Vadim Solovjov prelegis pri artefaritaj lingvoj kaj sonigis karaokeajn kantojn.

Registraĵo de la kunveno spekteblas en la Jutub-kanalo de REU
https://www.youtube.com/watch?v=MhoTyPnlTCM

Tie en Jubuto sub la video troviĝas teksta priskribo. Tie vi trovos la plenan enhavliston kun klakeblaj ligiloj ĉe ĉiu programero. Klakante iun el la ligiloj, eblas transiri tuj al la momento, kiam komenciĝas tiu programero, kiu vin interesis.

Aleksandr Lebedev.

**Servo subtenata de Universala Esperanto-Asocio kaj Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj**

ilei

Redaktoroj:
Stefan MacGill kaj
Mirejo Grosjean



**ENHAVO**

- Kuriero flugas
- Revuoj indas
- Eŭropa edukado
- Rusio rete

========= vortoj: 580 =========

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado. La prezento estas ĝisdata ĝisla fino de marto 2021 (per EKO 2021-12).. Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro.

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj, ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.